Eble kiam la aerveturiloj iĝas tiel oftaj kiel nun la fervojaj vagonaroj, anstataŭ tiel ruinigi la neĝkovritajn, maljunajn montojn de la mondo per ŝtalreloj, stangoj kaj tramaj metalfadenoj, la veturaj kompanioj uzos aerostatojn kaj aerodromojn por levi scivolajn homojn de la valoj ĝis la suproj, por ke ili staru mirigataj en la apudesto de la majesteco kaj la grandeco de la Naturo.

Versajne unu kompanio kiu havigis rajton konstrui fervojon ĝis supro de Wetterhorn, unu el la montoj de la Bernaj Alpoj, ne estis instigita tiom de amo al la beleco kiom de deziro provizi unikan veturrimedon per sia alpreno de metalfadena vojo anstataŭ fervojo. Estos kredeble ekscitigilo kaj pro tio sendube altiros amasojn. Krom tio per ĝi oni povos prezenti al la vidanto panoramon kiun oni ne povus gajni alie escepte per balono aŭ aerodromo. Tiu ĉi metalfadena vojo, aŭ pendigita ŝnurego, konsistas nur el aro da ŝnuregoj streĉitaj laŭ la montoflanko kaj posedas maŝinaron tiel aranĝitan ke dum unu vagono supreniras alia malsupreniras. La belega vidaĵo tiel havata estas preskaŭ senkompara ĉar la regiono ĉirkaŭ Wetterhorn estas fama pro sia beleco. La kontrasto inter la gajaj freŝaj paŝtejoj en la valo de Reichenbach kaj la grandegaj nigraj krutaĵegoj kaj brilantaj altaĵoj de ĉiama neĝo estas tiel rimarkinda ke pentristoj el ĉiuj mondpartoj iras tien por ĝui la belajn pejzaĝojn kaj gajni inspirojn por siaj verkoj. Wetterhorn aŭ “Monto de Ventegoj” estas unu el la plej rimarkindaj montoj el la Berna Altregiono; neniu el ĝiaj tri suproj estas malpli ol 3600 metrojn super la marnivelo. Oni unuafoje ilin supreniris en jaro 1844, piede per granda laboro, ago kiu reprezentas pli grandan penon ol sidi en bele remburita vagono kaj gliti laŭ longa metalfadeno tiel facile kiel birdo glitas tra la aero.

Kunparolante kun iu el la inĝenieroj dungitaj por la Wetterhorn'a projekto mi lernis ke li estas helpinta konstrui pli ol unu ŝnurvojon ĝis montsupro kaj

estis interese aŭdi lin priparoli pri liaj spertoj en tia laborado.

“La unuan fojon ke vagono portanta pasaĝerojn supreniris,” li diris, parolante pri unu el siaj supreniroj, “mi estis en ĝi. Estis la unuan fojon ke mi estis faranta tian supreniron kaj mi konfesas ke mi sentis strangan tremetan ataketon kapti min dum ni iris supren, supren, supren, kaj mi rigardis posten al la stacio kaj vidis kiel malĉika ŝajnas la ŝnuro tie kie la maŝino funkcias. Nevole, mi opinias, ĉiu ekkomprenis ke rompo je tiu punkto aŭ inter ĝi kaj ni sendus nian vagonon kiel pendulo svinganta tra vasta arko, neniam revenonta sur sian kurson tamen, sed frakasota en pecojn sur la severaj nigraj krutaĵoj malproksimaj de ni centojn da metroj, ĉe kies supro la ŝnuroj estis tenataj. Aŭ supozu ke rompo okazus ĉe la supra fino! Ni falus kiel plumbaĵo malsupren, malsupren ĝis morto en la valo malproksime malsupra. Ni plene komprenis tion sed diris nenion pri ta ebla sorto. Estis al ni ankaŭ stranga sento ĉe la oreloj, dum ni supreniris, ia surdeco kaj zumado en la posta parto de la kapo.

“Ia akcidento okazis ĉe la maŝinaro kiam ni estis irintaj ĉirkaŭe duonon da la vojo kaj la vagono devigis resti tie en la spaco dum tri kvaronoj de horo; pendigite inter la ĉielo kaj tero dum tiom da tempo ni havis okazon kutimiĝi al la situacio. Neniu el ni frenezigiĝis kiel unu viro sur la ‘Ferris Wheel’ ĉe Chicago kiam rompo ĉe la maŝinaro kaŭzis haltadon, kaj se tio estus okazinta al iu el ni kaj li estus provinta elsalti, oni ne povus simile lin savi, ĉar estis neniu virino en la vagono por ŝeti jupon super la kapon. Nekutima silento impresis nin ĉiujn. Nenia sono estis audebla krom la batado de niaj koroj, ĝis venteto ekblovis kaj facilitate svingis la vagonon kun kraketa brueto.

“Kiam oni komencis labori pri la maŝinaro malsupre ĉe la maŝindomo la vibroj de la martelado venis kiel ekbruoj de malproksima tondro laŭ la ŝtala ŝnuro. Ni kutimiĝis al tio tamen, post kelkaj minutoj, kaj interesiĝis pri la mirinda panoramo malkovrita malsupre de ni. Malproksime en la valo ni povis vidi la blankajn kamparajn vojojn sekvantajn siajn serpentajn kurojn laŭ la montetoj, kun tie aŭ tie ĉi makulo movanta kiu eble estas homo. La riĉaj verdaj kampoj

estis kiel veluro; ribandaj riveretoj kuris tra ili, brilante en la sunlumo; malproksime trans la valo blankaj montsuproj sin levis en majesteco kaj rekte antaŭ ni etendiĝis la granda, nigra, severa krutaĵego de la monto.

“Fine la vagono malrapide, skuete komence, ekmovis supren ĝis la vizaĝo de la krutaĵego estis apud ni, kaj tiam ni rampis de la supraĵo kaj estis fininta la veturadon kaj staris sur la firma tero, eĉ inter la neĝo kaj glacio.”

### JAVA POPOLRAKONTO.

MI volas diri al vi rakonteton, kiun mi aŭdis de la vilaĝanoj de la insulo Java.

Estis ŝtonhakisto kiu dehakis pecojn de la ŝtonego. Lia laboro estis malfacila kaj li ĝemis. Kaj en tiuj tagoj la reĝo rajdis tra la lando sur ĉevalo blanka kaj la viro malriĉa diris: “Ho, estu mi reĝo!”

Kaj okazis tiel kiel la viro diris: li estis reĝo kaj rajdis tra la lando sur ĉevalo blanka. La vetero estis varmega kaj la suno brilis kaj brulis en la ĉielo, kaj la reĝo estis tre varma kaj ŝvitis treege, kaj ĝemis: “Ho, estu mi la suno!”

Kaj okazis tiel kiel estis dirite; li estis la suno kaj brilis en la ĉielo kaj bruligis la tutan teron. Kaj nubo venis kaj naĝis inter la suno kaj la tero, kaj la radioj de la suno ne plu povis bruligi la kreskaĵojn kaj bestojn kaj homojn de la tero.

La suno koleris kaj diris: “Ho, estu mi nubo!”

Jen okazis tiel kiel li diris kaj li estis nubo, kaj naĝis tra l'aero kaj sendis pluvegon malsupren sur la tero, kaj riveretoj de la montoj kreskis al riveroj, riveroj al riveregoj kaj la vilaĝanoj ek-kriis: “Banjir, banjir!” kaj forkuris. La akvo ruinigis domojn, vilaĝojn, kampojn kaj pontojn, sed estis granda ŝtonego kiu staris en la kamparo kaj la akvo ne povis forŝiri ĝin. La nubo koleris kaj diris: “Estu mi ŝtonego!”

Kaj okazis tiel kiel estis dirite, li estis ŝtonego. Kaj li staris en la pluvo, en la suno, en la vento kaj li ne ŝanĝiĝis. Sed, unu tagon, venis viro kaj pikfosilo: estis maljuna ŝtonhakisto, kaj li dehakis pecojn de la ŝtonego.

La ŝtonego koleris kaj deziris: “Estu mi ŝtonhakisto,” kaj okazis tiel, kaj ree li ŝanĝis en ŝtonhakiston kaj li nun estis kontenta.

—R. Kerkhoven.

## LA EKSTERDOMA LERNEJO.

Doktoro J. H. SALISBURY, Chicago.

La instruistino de estinta tempo estus timegita per la penso de instruado ekstere sen domo en kiu enfermigi la lernantojn kaj haltigi la forirantajn pensojn kaj rigardojn de la instruotaj. En somero la fenestroj povis malfermigataj esti kaj la freŝaj ventoj povas eniri, portante la dolĉajn odorojn de herboj kaj floroj kaj novefaleita fojno, sed en vintro la plej granda zorgo devis esti prenita ke la malfortaj infanoj ne malsaniĝu per malvarmeo. Spite tiu ĉi zorgo la infanoj ne nur malsaniĝis de frosto sed ankaŭ de aliaj malsanoj kiuj akompanis la malpuran aeron. La tuberkulozo eble estis ofte transportita per la malpura, ĝermoŝarĝita aero de la lernejo. Pli racionaj ideoj estas nuntempe enirintaj la cerbojn de la lernejestroj kaj la freŝa aero permesata eniri en lernejbambrojn somere kaj vintre. Sed la lernejo sen ĉambroj estas tamen nova ideo. La malpura aero estas speciale danĝera por la tuberkuloza infano kaj tial la eksperimento estas provita permesante al infanoj foriri en la somero en la arbarojn por studi. Kelkaj de tiaj ĉi lernejoj estas fonditaj en Germanujo por la tuberkulozaj infanoj kiuj plimalboniĝis en la publikaj lernejoj kaj danĝerigis siajn kunlernantojn.

La unua de tiuj ĉi lernejoj en la Unuiĝintaj Statoj estis fondata per la Bostona Asocio kontraŭ Tuberkulozo kaj estas intencita por la tuberkulozaj infanoj kaj tiuj kiuj estas minacataj per tiu malsano. La eksperimento estas provita dum la estinta somero kaj estis granda sukceso. Tiu ĉi lernejo estis nomata la *School of the Outdoor Life* (Lernejo de la eksterdoma Vivo) kaj estis intencata por doni al tuberkulozaj infanoj: unue, freŝan aeron, due, sufiĉon da plej bona nutraĵo, taŭga por ili, kaj trie, naturan sanigan vivadon. La tendaro estis lokata en maljuna pomarbaro kies ombraĵo faras plaĉajn ripozejojn. Pendolitoj, klinseĝoj, kaj grandaj fojnaj kapkusenoj, faritaj de la infanoj mem, kun lanokovriloj por uzi en la pli malvarmaj tagoj kaj tendoj provizitaj kun litoj por okazoj plenigis la meblaĵojn. Aldone estis kuirejotendo kaj unu granda tendo por manĝo. La infanoj venis al la tendaro je oka horo kaj tuj pretigis sin por matenomanĝo, lavante siajn manojn kaj purigante siajn buŝojn. Post matenomanĝo la infanoj iris tuj por brosi la dentojn kaj poste por fari aliajn devojn. Regulaj grupoj estis asignataj por asisti aliafoje en

la diversaj domozorgaj operacioj kaj tiuj ĉi estis zorge dresataj fari sian laboradon. La infanoj estis kuraĝigataj okupigi sin en ĝardenolaborado kaj en la studado pri la kreskaĵoj ĉirkaŭ si.

La rezultatoj estis bonegaj en la korpa plibonigo de la infanoj kaj la lernado ne estis malzorgata. Tiel granda estis la sukceso de tiu ĉi somera eksperimento ke estas proponite ĝin daŭrigi dum la vintro. La Bostonaj lernejoj aŭtoritatoj sin kunligis kun la Asocio Kontraŭ Tuberkulozo subtenante la aferon. La lernejo estas lokata ĉe Parker's Hill apud Bostono. La lecionoj estas elportotaj en la ekstera aero ekcepte kiam pluvas aŭ neĝas. La malgrandaj skribtabloj kaj seĝoj staras sur planketoj malpeze konstruitaj. Lanokovriloj kun poŝoj por la piedoj kaj kruroj estos provizitaj kiam necese estos. Sirdometoj por protekti kontraŭ fortaj ventoj aŭ pluvo aŭ neĝo estas konstruitaj kaj provizo estas farita por okazoj de subita malsaneto.

Per tiu ĉi eksterdoma lernejo la infanoj anstataŭ fali malantaŭ siaj gradoj obtenos bonan edukadon dum la resaniĝado antaŭeniris. La eksperimento estas observata kun granda intereso de edukistoj higienistoj ĉie kaj se la vintra instruado ekster domo estos tiel sukcesa kiel la somera, la metodo estos sendube trovi multajn imitantojn en aliaj partoj de la lando.

## ELBERT HUBBARD.

El *The Philistine*.

Estas rakonto eldirita de Sinjoro Richard Burton. Ĝi enhavas nenian moralan signifon, kaj mi kredas ke ĝi estas Numero Ses lallapaloosalalulo (aŭ "egegego"), kvankam Sinjoro Richard, estante kavaliro de la Ora Ŝtrimpligilo, ne devas provi enpui: la pardonon de la Ananias'a Klubo, kaj samtempe celi briliĝi en la Asocio de Naturfalisistoj. Jen la rakonto:

Estis angla oficiro nomata Kapitano Pollard. Lia posteno estis okaze en la Malajuja Duoninsulo. Foje, vespere, en la krepusko la Kapitano promenadis la vojon, ĉirkaŭe duonmejlon ekster la fortikaĵo, kiam, subite, li aŭdis virinon laŭte kriegantan, petante helpon. Li rapidis antaŭen kaj ekvidis grandegan Hundvizaĝan Pavianon—ano de *Simia Majoralis*—duonportante, kaj duontrenante virinon. Kelkefoje la besto haltis por iom ripozi, sed neniam forlasis la manojn for de lia kaptaĵo. La vestoj de la virino estis disŝirataj en pecetojn kaj ŝia

vizaĝo estis surŝmirata per koto kaj sango, kie la besto ŝin mordovundadis. Si estis preskaŭ nekonscia, sed okaze kaj ree ŝi pli-fortigadis sin sufiĉe por kriegi.

La paviano ne sin retiris ĉe la alproksimiĝo de l'viro, kiel tia besto kutime agas, sed restadis kaj murmuregis batale kaj moke. La Anglujano eltiris pistoleton kaj, per bonecelita pafado, sendis kugleton tra la besta cerbo, aŭ almenaŭ, tra tiom da cerbo kiom ĝi posedis.

La virino estis, pro ŝiaj vundoj kaj pro la maldelikata manadaĉo, en kompatinda stato. La oficiro portis ŝin en fortikaĵon kaj ŝi zorgiĝis laŭ la plej bonaj metodoj de hodiaŭa ĥirurgio. Si estis, ŝajne, filino de ia ticia pundito, kiu dece informiĝis, sed ĉar la knabino suferis tiom pro ŝiaj vundoj kaj pro malforteco oni decidis ŝin lasi kelke da tempo en la militara malsanulejo. Si estis neordinare belega juna virino, Malajanino, kaj parolis taŭge anglan lingvon. vivinte kelke da tempo ĉe Baptista Misiisto. La ĝentila leganto, estante psikema, nun flugas pli rapide ol mi povas skribi—la anglujano amis la knabinon, kaj la knabino, dankema al viro, kiu ŝin savis, amis lin.

Sekve ili edziĝis je tagmezo en la konsulejo, per la postena dioservisto, laŭ la ceremonio de la Angla Eklezio. Estis kvietaj edziĝa soleno. La hejmaj amikoj estis sciigataj. Baldaŭ post lia edziĝo Kapitano Pollard transportiĝis al Hong Kong, tiam al Manila, tiam poste al Insulo de Martinique.

Jaro pasis, jaro de stranga, malrealaj, malĝoja feliĉeco,—kiam la novelzino ekvelkis. Ŝi malsaniĝis kaj mortis.

Sed, unu horon antaŭ foriĝo, ŝi gestis ke ŝia edzo alproksimu la liton sur kiu ŝi kuŝadis.

Per malforta spirado, kaj kun doloraj paŭzoj, ŝi spasme diris, "Mi estas mortanta—mi sentas—mi sentas—mi sentas ke mi ne devas morti kun mensogo en la koro. Mi—mi ne deziris ŝajni maldankema—al vi—sed mi—mi neniam amis vin—virino amas nur unufoje—vi devas min pardoni—mi amis—mi amis—mi ĉiam amadis la Hundvizaĝan Pavianon!"

Ŝi malleviĝis, kaj ĉio silentis. Kaj ekstere la nuboj trapasadas la vizaĝon de la bluo, kaj malproksime ĉe la bordo de la venanta nokto, la kukulo alvokas kortuŝe sian kunulon.

(Tradukis H. B. Besemer.)

## PRI RUSUJO.

Esperantigita el la franca laŭ O. Mirbeau de  
BENEDICT PAPOT.

**Noro.** Tial ke Oktavo Mirbeau estas nuntempe unu el la plej diskutataj francaj verkistoj pro la malgranda ventego de li kaŭzita per lia teatraĵo "La Hejmo.", lastan monaton en la "Franca Teatro" prezentita, mi tradukis el unu el liaj verkoj la jenajn paĝojn.

Mi ricevis hodiaŭ longan leteron de mia amiko Ulriko Bajero, kiu nuntempe vojaĝas en Rusujo. El ĝiaj multaj folioj mi elektas jenajn premegantajn paĝojn.

En la urbejoj mi vidis belajn kavaleriajn regimentojn. Tiujn oni fanfaronade montras al fremduloj, kiel dirante: "Jen terura kaj brila milististaro! Ve! al kiu ĝin atakos!" Fakte, ili ne estas regimentoj da soldatoj, sed ŝercemuloj. Mi ĉeestis multajn paradojn kaj havis ĉiufoje la impreson, ke mi ĉeestas cirkon. Vere estas tiuj rajdistoj mirigantaj, ili faras mil lertajojn, ekilibraĵojn kaj gimnastikaĵojn sur ĉevaloj al tiuj ludoj dresitaj, kaj ĉio tio brilegas,—sed mi multe timas, ke malantaŭe de tio estas nenio.

Revenante, tiun ĉi vesperon, al mia gastejo tra unu el la antaŭurboj, mi ekvidis, sidantan sur limŝtono ĉe la stratangulo, maljunan Hebreon kun hoka nazo, forka barbo, lumaj okuloj kaj per malbonodoraj ĉifonaĵoj vestita. Malgraŭ ĉio li estis tre bela. Li varmigiĝis sune sian korpaĉon.

Oficiro pasis, trenanta sur la strato grandan glavon. Ekvidante la Hebreon, li haltis apud li, kaj tute senkaŭze, nur kiel bruta amuzaĵo, komencis insulti lin. La maljuna Hebreo ne ŝajnis aŭdi lin. Furiozigite per lia inercio, kiu ne estis timo, ne eĉ malŝato, la oficiro vangofrapis la muljunulon per ganta mano kun tiom da forto, ke la malfeliĉulo falis teren, kie li konvulsie movis la kruojn, kiel per pafado trafita leporo. Pasantoj, kiuj baldaŭ fariĝis amaso, haltis ĉirkaŭ la falinta Hebreo kaj, per la aventuro feliĉigitaj, diris: "Hu! hu!" kaj malnoble sputis en lian barbon. La Hebreo multpenade sin relevis, ĉar li estis tre maljuna kaj pli malfortika ol infano, kaj, sen iom da kolero en siaj okuloj, kiuj nur pentris miregon pri tia neklarigebla, mallogika bruteco, li diris: "Kial ĉi min batas? Ĉu mi ĉin sentvundis iamaniere? Ĉu ĉi havas kaŭzon por plendi pri mi? Ĉu ĉi min eĉ konas? Bati min estas nesencaĵo. Ĉu ĉi estas frenezulo?"—La oficiro daŭrigis sian vojon sekve de la tuta amaso, kiu lin akklamis kiel heroo.—La maljuna Hebreo kviete reprenis

sian sidejon sur la limŝtono.—Mi interparolis kun li, li diris min: “Ĉiu el ili agas tiamaniere. Ili batas nin senrajte. Tiu ĉi oficiro ne scias kion li faras. Sed post ĉio li ne estas malbonulaĉo. Li povus mortigi min. Neniu al li dirus ion; kontraŭe, ĉiuj lin gratulus, kaj li sendube estus promovigita. Ne! vere, li ne estas malbonulaĉo!”

Penetrinte pli profunde en la landon, malproksimen de la grandaj urboj kaj de la industriaj laboroj, oni vidas nur mizeron kaj mizeregon. Tio premeblas la koron. Ĉie oni vidas kavaĵajn vizaĝojn, kurbigitaj dorsojn, plendantajn kaj sklavemajn spinojn. Io neklarigeble dolora pezas sur la nekulturata tero kaj sur la per malsato malfortigitaj homoj. Oni dirus, ke mortvento ĉiam blovas sur tiujn ĉagrinegajn ebenajojn. La malhelaj arbaroj, kie dormas la lupoj, elrigardas funebraj, kaj la urbetoj ŝajnas tiel malĝojaj kiel tombejo. Oni nenie ekvidas plu brilajn uniformojn, nek valsantajn ĉevalojn; la rajdistoj kaj iliaj ŝercemaj gimnastikoj malaperis. Mi demandas: “Kie estas la armeo? tiu ĉi timeginda armeo?” Tiam oni montras al mi ĉifone vestitajn, senbataliajn, senŝuajn estaĵojn, la pli multo el ili ebrigitaj de brando; tiuj sovaĝaj almozuloj, vagistoj de la mortplena krepusko, eraras sur la vojoj, kaj, nokte, rabas la kamparanojn,—ne ekzistas alia. Oni tenas, tie ĉi kaj tie, belajn regimentojn dancantajn kaj muzikon ludantajn, sed tiuj ĉi malriĉuloj estas la armeo.—Oni ne devas tro mallaŭdi ilin pri tio, ĉar ili ne estas feliĉaj nek ricevas nutraĵon ĉiutage. Alia konfesas al mi: “Ne ekzistas armiloj, nek municioj, nek provizaĵoj en la armilejoj kaj magazenoj. Oni vendas ĉion. La diablo scias al kiu, sed tie ĉi oni vendas ĉion.”—Cetere, kiel vi vidos, mi pruvos tion.

De kelke da semajnoj, mi estas gasto de princo Karegino. Lia kastelo estas admirinda. Estas amaso da konstruaĵoj, grandkorto, reĝaj terasoj kaj mirindaj ĝardenoj. La vivado tie estas viglega, brila kaj brua, kiel en granda urbo. Estas ĉevaloj por cent ĉevaloj, servistaro milite disciplinita kaj galonovestita kiel statistikoj en la teatro. La kuirado tie estas bonega, la vinoj neordinaraj, la virinoj ĉarmaj kaj pensantaj nur al amo. La apartenantaĵoj de la kastelo enhavas, ebenaĵe kaj arbare, spacon tiel granda kiel malgranda reĝlando. Ni multe ĉasadas kaj mi kredas, ke ne ekzistas ie en Franclando, eĉ ĉe niaj plej riĉaj financistoj, ĉasejoj tiel plenaj je ĉiaj ĉasaĵoj. Ĉiun

tagon, estas vera buĉado, pleneco da detruo, rugaj amasiĝoj da mortigitaj brutoj. Nokte, baloj, komedioj, freneza koketado, noktaj festoj en la ĝardenoj. Sed mi tamen estas malĝoja, malĝojega. Mi ne povas kutimi je tiu ĉi frenezo da eleganteco, lukso, daŭrigantaj plezuroj; ĉio tio kontrastas tiel maldolĉe kontraŭ tiu ĉi frenezo da mizero kiu ekzistas tie ĉi, proksime de mi. Malgraŭ la ĝojo kaj ravo kiu allogas min, ŝajnas al mi ĉiam, ke mi aŭdas ion, kio ploras ĉirkaŭ mi. Mi ne povas forpeli tiun ĉi konsciencan riprocon, kiun mi senĉese sentas—la riprocon pri partoprenado al tiuj ĉi ebriaĵoj el la turmentego de tuta popolo farita.—Hieraŭ, dum la ĉaso, tri vilaĝanoj estis nelerte mortigitaj: Triviala ago, cetere, kiu ne kalkuliĝas. Oni lasis ilin kie ili falis. Dum armeo da servistoj kolektis la mortajn ĉasaĵojn, restis la kadavroj de la tri vilaĝanoj sur la musko, en la tragedia pozo en kiu ilin kuŝigis la kugletaĵo de la ĉasintoj. Oni ne enterigos ilin. “Kia bono?” diris al mi la princo, respondante al mia demando, “La lupoj venos preni ilin, la venontan nokton, kia pli bona tombo por tiaj homaĉoj?” Kaj neniu parolis plu pri tio.

En la tago kiam mi alvenis al la kastelo, traŭrite tra triumfaj kortoj, pasinte sub pordegoj, marŝinte laŭlonge de kolonaroj kaj de lagetoj ĉirkaŭitaj per marmoraj, mi rimarkis apud la granda perono—monumentaj ŝtuparoj ornamitaj per statuoj el ruĝa porfiro kaj balustradoj el verda marmoro,—mi rimarkis malbelegan budon, el malbone kunigitaj tabuloj faritan kaj tegmente per branĉfaskoj de betulo kovritan. Ĝi staris sur la beleco de tiu ĉi fasado kiel ŝankro sur freŝa virina vizaĝo. Vidante, ke mi miris, la princo diris al mi: “Jen budo estas la plej bona parto de mia riĉaĵo. Estas tie, ke mi vendas brandon al miaj kamparanoj. —Ĉiuj grenoj kaj terpomoj el mia bieno trapasas tie transformitaj en alkoholon.” Kaj li gaje aldonis: “Vi venas en landon de ebruloj! Plimalbonaj ebriguloj ol miaj landanoj ne ekzistas.—Ĝuste tagoj, kiam ĉiu estas ebria sur miaj propaĵoj—Estas kurioze, vere, kuriozege!—sed kion vi volas? Ju pli ili trinkas, des pli riĉa mi estas!” Nu, la princo estas rajte rigardita, kiel la plej liberema el la sinjoroj.—Fakte, li faris multon pro la landanoj, li eĉ estas, en altaj lokoj, suspektita pri liberemeco.—Kiaĵ do povas esti tiuj, kiuj ne estas?

Iam mi eltrovis, ke ne restis plu eĉ unu kartoĉo en la domo; des pli malbona el-

trovo, ke granda ĉaso estis okazonta dum la morgaŭa tago. Sendi iun al la urbo tre malproksima de la kastelo ne estis penseble, ĉar dum la antaŭa tago per terura pluvego fariĝis la vojoj neireblaj. Kaj ĉiuj malĝojegis. "Jen!", diris la princo, "ni iru ĝis la armilejo. Eble ni trovos pulvon tie."

"Kio?" mi ekkriis, iom surprize, "la armilejo vendas pulvon?" "Certe, mia kara, pulvon, pafilojn, pafilegojn, ĉion, kion vi deziras."

La armilejo estis nur kelke da kilometroj-malproksime de la kastelo. Post la matenmanĝo ni iris tie vagante.

La deĵoranta oficiro nin akceptis tre gracie. Respondante al la demando de la princo li ekkriis:

"Kiom malĝojega mi estas! Ni vendis matene la malmulton al ni restantan."

"Sed en la kuglejoj? en la kartoĉejoj?"

"Malplenaj, tute malplenaj."

"Kiel enuigante!"

La oficiro pripensis momente kaj diris: "Eble, ke la soldatoj havas ankoraŭ kelke da kartoĉoj en la kartoĉujoj!"

"Vidu do pri tio, sinjoro," petis la princo. La oficiro eliris. Post kelke da minutoj, li ree eniris, sekvita de soldato, kiu alportis specon de korbo en kies fondo kuŝis proksimume centon da kartoĉoj. La oficiro diris:

"Tio ĉi estas ĉio, kio al ni restas.— Senkulpigu nin."

La princo demandis:

"Kiom, Sinjoro?"

"Dek rubloj, via princa Moŝto."

"Diablo!" diris la princo, "Estas iomete multekoste."

"Nu, tie ĉi oni ricevas nenion senpage."

Dum ni iris hejmen, la princo diris al mi: "Ĉarma lando, ne vere? Se vi havus sufiĉe da mono por pagi, vi tre facile povus transporti ta tutan artilerion de nia patreto la tsaro Francujon."

Mi ridetis kaj diris:

"Tio estus sendube tre multekosta."

Kaj la princo aldonis flegme:

"Tio dependas de la okazoj."

Nova kaj vigla ĵurnalo estas *Le Monde Esperantiste*, publikigita ĉe No. 3, Rue Sophie-Germain, Paris. Ĝi estas redaktata france, angle kaj esperante, kaj la unua numero enhavas dek ses trikolonajn paĝojn.

En antaŭproksima numero de *L'Aero*, la grava franca ĵurnalo aeronautika kiu nun havas regulan fakon de Esperanto, Sro. Archdeacon rakontis esperante pri siaj spertoj kaj sentoj dum flugo sur la maŝino de Farnam.

## LA AMEMAJ FRATOJ.

Angle verkita de CLARENCE COOK  
Tradukita laŭ la nerimanta verso de la originalo,  
de  
D. E. PARRISH.

Abramo kaj Zimrio kunposedis Ebenan kampon en kaŝita valo. Plugilon unu ili ambaŭ uzis, Kaj semis kune fruktodonan semon. En la aŭtuno kiam la terĝlobo Ridetas gaje pro la grenoriĉoj, Alportis ĉiu al garbejoj siaj Duonon da la garboj, multlabore. Edzinon kaj sep filojn Abram' havis; Zimrio sole loĝis sian domon. Dum restis en la kampo la garbaroj, Zimrio nokte en la lito kuŝis, Enmense kalkultante sian gajnon. Li pensis pri la sorto de la frato, Kaj diris—"Mi ĉi-tie loĝas sola, Sed li, Abramo, havas familion; Egale ni dividas la garbarojn;— Li ja por vivo pli ol mi bezonas; Leviĝos mi kaj zonos min kaj iros, Ĉar al garbaro lia mi aldonos." Li do leviĝas; zonas siajn lumbojn,— Kviete al la kampo li aliras. La luno inter nigraj nuboj brilas— La arboj kontraŭ la ĉielo staras— La branĉoj en la vento paroletas. Gvidata per la malbonlum' Zimrio Malsupreniras laŭ vojet' la kampon, El sia staplo prenas li trionon. Metinte ĝin kun tiu de Abramo, Li iras domen al feliĉaj songoj.

Samnokton dum Abramo lite kuŝis, Pensante sian propran feliĉecon, La sorton de Zimrio li ekpensis, Kaj diris—"Li tutsola loĝas tie, Neniu lin helpante, kaj vespere Ĉi hejmen iras al malvarma domo, Kaj havas ja malmulte da amikoj Krom mi kaj miaj,—(Ĉar ĉi-tiuj fratoj Kulturis sole tiam en la valo)— Dum mi, al kiu la Ĉielo benis Per filoj kaj edzin', feliĉe vivas; Al mi laboron ili malpezigas; Kaj tamen, mi ricevas la duonon. Ĉi-tio certe plaĉas ne al Dio. Mi ellitiĝos, zonos min kaj iros La kampon, kaj el garbostaplo mia Mi ĉerpos por aldoni al la lia." Li ellitiĝas, zonas siajn lumbojn, Kviete al la kampo li deiras. La luno el arĝentaj nuboj brilas— La arboj, nigre kontraŭ la ĉielo— Folioj movetiĝas, paroletas.



Abramo per la duba lum' gvidata,  
Malsupreniras laŭ la monta vojo;  
Trionon malavaran da la garboj,  
Li metas kun la staplo de Zimrio,  
Kaj hejmen iras al feliĉaj songoj.

Vekiĝis ambaŭ fratoj je la suno,  
Kaj kiam ili vidis la garbarojn,  
Miregis ĉiu, ĉar la du staplegoj  
Restadis samaj, malgraŭ la donaco.  
Zimrio, postan nokton iris kampen,  
El siaj garboj prenas la trionon  
Donante ĝin al staplo de Abramo,  
Kaj poste sin kaŝigas por spioni.  
La luno tra la nuboj elrigardas—  
La cedroj, nigraj en la malbonlumo—  
Venteto olivbranĉojn svingetadas.  
De sia domo nun Abramo venas,—  
Maldekstren, dekstren, ĉirkaŭrigardante.  
El lia provizio la trionon  
Li metas sur la staplon de la frato.  
Zimrio el la ombroj eksaltante  
Lin tiras ĉirkaŭpreme en la brakojn,  
Sur lia kolo ploras, lin kisadas.  
Abramo ekkomprenas, sed ne povas  
Paroli, pro la ĝojo en la koro.  
Denove siajn domojn ambaŭ iras,  
Al Dio dankegante tiun amon.

### LA VENONTA SESO.

Du sinjorinoj, malnovaj amikinoj, renkontis sur la strato. Ambaŭ estis edziniĝintaj kun muzikistoj. Unu el ili estis puŝanta infanetan veturileton enhavantan tri belegajn trinaskitojn, ĉiuj knabinoj. La alia sinjorino edziniĝis antaŭe nur kelkajn semajnojn.

“Kiaj belegaj infanoj!” ekkriis varme la nova edziniĝinto post interŝanĝo de salutoj.

“Jes,” respondis la fiero patrino, “kaj estis plej amuza kunokazo. Ĉe nia edziĝa festo la muzikaj kunuloj de mia edzo faris serenadon al ni, kaj ili muzikis “*La Tri Malgrandaj Subretinoj*” el la “Mikado.” Ĉu tio ne estas stranga?”

La nova edziniĝinto spasme spiris, kaj paliĝis pro teruro. “Kompatema ĉielo!” ŝi spiregis, “Ĉe nia edziĝa festo, antaŭ kelkaj semajnoj, la amikoj de Tomĉjo ankaŭ faris serenadon al ni, kaj ili muzikis la ‘*Seson*’ el ‘*Lucia*.’” Tradukis W. M. AMPT, *Cincinnati, Usono.*

### PROKSIMECO.

Ni aŭdas tre ofte ke bona pafarko  
De Amo, la dio povega,  
Geedzigas ja kiujn elfrapas sagmarko,  
Se estas eĉ ĉiu timega.

Sed estas mensogo de Amo la ruza,  
Por sian malkaŝon eviti,  
Li ĉiujn blindigas per fablo amuza,  
Por ĉerĉmagiiston imiti.

“Rigardu pafarkon!” tre laŭte li krias,  
Kaj dum ni rigardas malsaĝe,  
La ilon la veran li tuj produktas,  
Uzanta ĝin mire sovaĝe.

Laufakte nun estas ĝi nur proksimeco,—  
La tutan aferon ĝi kaŭzas,  
Plejparte per tiu okazas edzeco,  
Kaj tamen kaptotaj ne paŭzas.

“Ĉu estas la sento la vera?” Vi miras,  
“En koro de l’ homo vekita?”  
Ho ne, tia sento animon ne ŝiras  
De iu iam atakita.

Rapide ni fugu do tiun danĝeron.  
En urbo aŭ en la kamparo,  
Ĉar ekproksimecoj nun kovras la teron,  
Gvidantaj nin al la altaro.

—Ivy Kellerman.

### PAOLO KAJ FRANĈESKO.

*Kanto V, 121-138.*

Kaj ŝi al mi, “Kia pli granda doloro  
Ol memoriĝi pri tempo feliĉa  
En la mizer’?—scias doktoro via—  
Sed se por koni la unuajn radikojn  
De nia am’ ci tian emon havas,  
Mi cin rakontos, dume ploradante.  
Ni legis, unu tagon, por plezuro,  
Pri Lanĉeloto, kiel am’ lin premis,—  
Ni estis solaj, kaj nesuspektemaj.  
Multfoje tiu lego la okulojn  
Levigis, kaj vizaĝojn tutpaligis,  
Sed sole unu punkto venkis nin,  
Leginte pri la dezirita rideto  
Kisita de amanto tiel granda,  
Ĉi tiu—kiu estu for neniam—  
La buŝon mian kisis tremegante:—  
Galeoto estis libro kaj skribinto,  
Kaj tiun tagon ni ne legis plu.”

El la Itala Tradukis

—William Parker Bonbright.

## EL TRANS LA MARO

Dum la jaro 1908 la Esperanto-afero ĉiam progresis en Eŭropo, sed pro la grandiozaj deklaroj de la tiel nomata internacia delegacio, la movado estis iom malrapidigita per la duboj de kelkaj esperantistoj, kaj la eksigo de malmultaj. Tamen, jam de longe nur la plej fanatikaj Ŝanĝemuloj kaj la plej facilaj ventluduloj povas fidi al la pretendoj de la delegacio. Sekvas ke, post iom da malrapidigo la movado nun kreskas fortege en tuta Eŭropo. Malgrandaj nacioj, el kiuj unu tuta ne superus en grandeco kaj nombro da loĝantoj la usonan ŝtaton Massachusetts, subtenas ĉiu sian bonegan esperantan gazeton kaj grandan esperantan societon. Novaj gazetoj aperis multnombro en la komenco de la jaro 1909, kaj grandaj firmoj de libroeldonistoj, kiuj ĝis nun sin tenis aparte de la esperantista afero, ankoraŭ dubante pri ĝia daŭra sukceso, ne plu tion faras. Inter la multaj kiuj nun entreprenas la eldonadon de esperantaj libroj oni povas citi tiun grandan kaj mondfaman firmon el Londono, Cassell & Company.

Pri la movado en Usono, oni povas diri ke ĝi mirinde kreskis dum la tuta jaro 1908, kaj ke la delegacia entrepreno pri ŝanĝoj en Esperanto preskaŭ tute ne altiris la atenton de la usonanoj ĝis Decembro, kiam ŝajne aŭtentika depeŝo vaste dissemita per la Ligo de Jurnaloj (*Associated Press*) anoncis la aliĝon de la New York Esperanto Society al la skismeto. La nomo de tiu "societo" forte influis multajn, kiuj ne povis kompreni ke nur kvin personoj voĉdonis pri la ago de la societo, kaj ke du el ili balotis kontraŭ la skismon. La movado en Usono sentis la forton de tiu frapo en la nasko de duboj kaj hezitaj ĉe kelkaj kiuj ne povis tuj lerni la veron, kaj la subita eksigo de kelkaj individuoj kiuj estis la plej laŭte deklamintaj pri sia ĉiama fideleco sukcesis daŭrigi la influon dum kelkaj semajnoj. Estas vere, ke dum tiuj semajnoj la movado kreskis pli rapide ol antaŭe, sed tio ne malpermesas kredi, ke sen la skucto kiu sekvis la forsalton de la Timidoj fondiĝus pli multe da kluboj. Nun, tamen, la movado regajnis la tutan forton, multaj kluboj kaj klasoj formiĝas en la tuta Norda Ameriko kaj, kvankam la neevitebla somera letargio baldaŭ nin kaptos, estas certe ke antaŭ la fino de la jaro ni povos certigi al ni, ke la jaro 1909 vidis la plej grandajn sukcesojn por Esperanto ĉe ni.

Estas ridinde diri, ke la tuta esperantistaro de Usono ne scias pri la delegacio kaj la Timida

movado. *Amerika Esperantisto* publikigis ĉiujn adresojn de asocioj, kaj ŝanĝistoj ĉiam sendis al ili sian propran historion. Manko de mono eĉ ne malhelpas en tio, ĉar la lasta ekspedo de malveraĵoj fariĝis, evidente, per la ŝtelado de afrankitaj kovertoj el unu ŝtata ministrejo. Ne estas necese demandi, kiom da konfido oni povas doni al propagandisto kiu ŝteletas regnajn kovertojn por sia celo. (Por pruvo de tio ĉi, vidu kovertojn elsenditajn kun papero gluita sur angulo, kovranta la propran nomon, *Minnesota State Board of Control*).

*Belgujo*.—La Esperantistoj jam de longe havas sian propran organon, *Belga Esperantisto*, kiu raportas pri ĉiamaj progresoj.

*Britujo*.—Nur legante tiun eksterordinare bonan propagandan gazeton, *The British Esperantist*, oni povas plene sciigi pri la granda agemeco de la movado en Anglujo, Skotujo, Kimrujo kaj Irlando. En la marta numero ĝi raportis speciale pri 58 diverslokaj societoj sur la insuloj. En kelkaj urboj Sro. Privat faris anglan paroladon pri Esperanto kaj instruis klasojn. La registro de kluboj nun montras, ke la Brita Esperantista Societo havas da filioj pli ol 120. Lokaj jurnalaj en Anglujo multe traktas pri la progresado. Sufiĉu la jena ekzemplo por klarigi kiel oni faras en Londono, kie ekzistas 17 kluboj: En Queen's Hall (evidente aŭlo sufiĉe granda pro tio, ke la lokojn oni vendas je sep prezoj, po unu ĝis ses ŝilingoj) okazis Esperanta koncerto en kiu parteprenis du horoj, ĉiu havanta cent kantistojn, kaj multaj solaj kantistoj.

*Aŭstrujo*.—Tie ĉe la klubo esperantista de Vieno klopodas je la administraro de la fervojoj por instrui la lingvon Esperanto al ĉiuj fervojistoj kiuj multe traktas fremdlandulojn. Oni klopodas ankaŭ pri eldonado de informtabeloj, ktp., en Esperanto.

*Francujo*.—Senĉese kaj forte kreskas Esperanto en Francujo. Oni fondas multajn novajn grupojn, kaj la malnovaj varbas novajn anojn. Estas en la tuta lando 213 societoj, kaj en Parizo mem dudek kvin. Dro. Pierre Corret, sekretario de *Lingvo Internacia*, verkis tezon pri la Utileco kaj Eblecoj de Esperanto inter la Kuracistaro. Pro tio li ne sole ricevis honoran sukceson pri sia ekzameno, sed varbis al Esperanto siajn ekzamenintojn. Unu firmo de literfandistoj en Parizo ĵus eldonis katalogon en kiu ĝi nun proponas literojn supersignitajn por Esperanto en 89 diver-

saj specoj kaj grandecoj! Kontraŭ tia gravega fakto, tamen, oni ne povas esperi, ke ne plu soniĝos la hipokrita krio, "oni uzas la supersignitajn literojn nur por starigi monopolon en la presado."

*Germanujo.*—Oni multe parolis pri dek kvin idistaj grupoj en Dresden. El tiuj, nur unu nun restas. La anoj aŭ forlasis la aferon aŭ aliĝis al Esperanto (afero tute ne unika al Dresden). Samtempe, Esperanto grandege kreskas. En Leipzig oni havis kunvenon da cent delegitoj kaj organizis ligan por Saksujo sole (ŝtato pli malgranda, ol multaj usonaj) kiu havas 3,000 anojn. En la jara kunveno de la Germana Esperantista Asocio la raportoj montris, ke la nombro da anoj duobligis dum la lasta jaro (ree la vero kontraŭ la raporto ke "la germanoj forlasis Esperanton" por la fikajo). En Dresden estas speciala klaso por policanoj, el kiuj 135 regule ĉeestas.

*Svisujo.*—En la Geneva Urba Kolegio oni havas laŭvolan kurson en Esperanto, kun la oficiala apogo de la ŝtata konsilantaro pri edukado. Kun oficiala apogo de la direktoro de publika instruado oni instruas Esperanton en la ŝtata normala lernejo ne Neuchatel. Laŭ *Lingvo Internacia*, novaj grupoj fondiĝis en Luzern, Davos, Bauma, Renens, Munsingen, Melchnau, Gondiswil kaj Lagenthal.

*Hispanujo.*—Ĉar oni ne plu povas eĉ dubi pri la certigo ke Esperanto sukcese pasis la periodon de danĝero kiun liveris al ĝi la naivan agado de la "delegacio," la antaŭsignoj montras, ke la kvina kaj hispana kunveno estos la plej granda ĝisnuna mondkongreso de Esperanto. En la kongresurbo, Barcelona, oni instruas 46 klasojn!

*Portugalujo.*—Aperis en marto nova gazeto, la sola en tiu lando. Ĝi estas *Portugala Revuo*, la prezo estas du spemiloj por jaro, la adreso Rua de Rosario, 215, Porto. La grupo de Lisbono entreprenas grandan propagandon tra la tuta lando.

*Svedujo.*—En tiu ĉi lando estas nun stato simila al tio, kio okazis en Belgujo. Redaktoro de ĵurnalo. Sro. Ahlberg, kiu de kelkaj monatoj estis pli malpli malkaŝe idista, nun konfuzas la movadon redaktante sian ĵurnalon, kiu neniam havis la forton eldoniĝi regule, en ambaŭ Esperanto kaj la "simpligita" lingvo. La sekvo estos simila al tio en aliaj lokoj. Novaj esperantistaj propagandistoj prenos per siaj manoj la standardon, kaj ni ne longe devos atendi la eldonadon de *Sveda Esperantisto*, kiu liveros al ni efektivan propagandon, kiel faras *Belga Esperantisto* kaj *Franca Esperantisto* anstataŭ la pezozaj lingvatraj diskuturoj per kiuj sin amuzas *Belga Sonorilo* kaj *L'Esperantiste*. Oni povas nur gratuli la svedojn pri sia nuna stato se el tio naskiĝos tia granda kaj vigla sukceso kiel tio, kio venis al la francoj kaj belgoj per la forlaso de iliaj unu-homaj organoj.

*Polujo.*—En tiu ĉi malgranda lando nun ekzistas 14 societoj esperantistaj, havantaj pli multe ol 2,000 membrojn. Varsoviaj komercistoj fondis komercan sekcion de la Pola Esperantista Societo. En Galicio Esperanto estas oficiale enkondukita en la komerca akademio, kaj la kontraŭalkohola societo decidis akceptin ĝin por ĉiuj fremdlandaj korespondadoj.

*Bohemujo.*—Nenie kreskas la esperantista movado pli forte, ol en Bohemujo, kie kelkaj lokaj ĵurnaloj havas regulan rubrikon esperantan, kaj la du esperantistaj societoj havas pli ol 3,000 membrojn.

*Jeruzalemo.*—Laŭ raporto presita en *The British Esperantist*, la aŭstria konsulo en Jeruzalemo estas honora prezidanto de la tiea grupo esperantista, kiu havas kunvenojn ĉiusemajne. El la dudek membroj, ses estas pastroj. Estas fondita dua grupo en Siria Rifuĝejo por Orfoj, sub instruado de la ĉefa instruisto.

*Brazilujo.*—La dua nacia kunveno de esperantistoj estis plena sukceso. Ĝi okazis en San Paŭlo de la 16a ĝis la 19a de Januaro, kaj la ĉeestantoj estis multaj. Oni havis specialan vagonaron el Rio de Janeiro ĝis San Paŭlo, kaj la registaro permesis la senpagan uzadon de la poŝto kaj telegrafo por la oficialaj aferoj de la kongreso. La ministroj de Internaj Aferoj, de Financoj kaj de Militaj Aferoj sendis ĉiu sian reprezentanton al la kunveno, kaj tiu de la Internaj Aferoj prezidis la unuan kunsidon.

*Japanujo.*—Pro tio, ke la raportoj pri tiu lando estas redaktataj japane en la tiea ĵurnalo oni ne povas sciigi detale pri la movado en la "lando de la sunleviĝo." Tamen, la konstanta plibonigado kaj pligrandigo de *Japana Esperantisto* montras, en kiun direkton blonas la vento. En sia januara numero, la plej bona el ĉiuj, tiu revuo traktas pri la veno de "idismo" al Japanujo kaj diras ke la demando estas jam nun enterigita kaj ke ĉio iras bone kaj trankvile.

*Bulgarujo.*—En tiu malgranda lando Esperanto estas jam de longe instruita al multaj kaj oni havas bonan ĵurnalon, *Lumo*. La lasta numero raportas fondon de grupoj en Pirdop, Jambol, kaj Osma-Kalugerovo.

*Rumanujo.*—La grandega progreso farata de Esperanto en tiu ĉi nacioto montriĝas per du gazetoj, el kiuj ambaŭ estas bone redaktataj kaj vigle interesaj. La rumanoj lastjare kunvenis kun la bulgaroj en Sumen, kaj en 1909 oni tenos trinacian kunvenon en Bukarest—rumanoj, bulgaroj kaj serboj.

The Aero Club de France is giving serious attention to Esperanto, as the language commends itself especially to those who expect soon to be able to fly to foreign countries. L'Aero, one of the leading journals of aeronautics, publishes an Esperanto department.

## ESPERANTO ĈE INTERNACIA EKSPOZICIO

El la "Pittsburgh Dispatch"

Kiel praktika elmonro de la kapabloj de Esperanto, la helpa lingvo internacia, en la agadoj de la mondo, oni ĵus anoncis ke estas baldaŭ okazonta en Italujo, internacia ekspozicio, rilate al kiu oni intencas fari ĉian korespondon per Esperanto.

La novaĵo estas intencata kiel eksperimento. La ekspozicio okazos en Bolonja (Bologna), sub la aŭspicioj de la Asocio "Verda Kruco" por Publika Helpado, kaj enhavos elmontraĵojn pri arto, laboro, nutraĵo kaj higieno inter siaj plej gravaj fakoj. Tiu ĉi asocio estas unu el ĉeno da tiaj organizaĵoj ekzistantaj en la pli grandaj italaj urboj, havantaj kiel celon la bonvolan intencon instrui la popolon per tiaj ekspozicioj klamantere ĝui la plej bonajn aferojn kiujn la vivo povas doni. Kelkavorte, estas eduka propagando, lom simila al la elmontraĵoj pri puraj nutraĵoj prezentitaj en tiu ĉi lando, sed laŭ pli granda kaj pli grava skalo.

